



TEJO-KER trejnado

Tiu-ĉi dokumento estas plano por ĉeesta trejnado pri TEJO-KER al junaj esperantistaj aktiv(em)uloj, kiuj jam regas la lingvon almenaŭ B2 nivele, sed prefere C1 nivele. La celo de la trejnado estas, ke la partoprenantoj havu trarigardon de la laboro en la komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, kaj kaze ke ili interesiĝas, ili sciui kiel ekscii pli pri tiu kampo kaj partopreni la agadon. Se vi planas uzi tiun-ĉi trejnadmaterialon, bonvolu kontakti ker@tejo.org kaj at@tejo.org.

Klarigo de simboloj, vortoj:

n dum la trejnado ofte estas grupaj laboroj, la grupoj konsistu laŭeble el 3-6 partoprenantoj, kaj estu laŭeble 3-6 grupoj. n estas la nombro de la grupoj dum la trejnado, aŭ se la grupnombro ŝanĝiĝas dum la trejnado: tiu de la aktuala grupnombro

tasko signifas ke ĝi estas aktive engaĝiga ero de la trejnado

Antaŭ la kunveno la trejnisto

1. Aŭskultu la videojn* kaj aŭ pretiĝu por fari similajn ĉeestajn prelegojn, aŭ pretigu projekciilon kaj taŭgan ludilon por ludigi ilin por la aŭskultantoj.

2. Printigu $n+1$ ekzemplerojn de la dokumento „Lingvopolitikaj pozicioj de TEJO”, kaj distranĉu n ekzemplerojn unuope tiel, ke tranĉu ĉiam post la demandoj kaj antaŭ la respondoj, metu la distranĉitajn dokumentekzemplerojn respektive en malsimilajn ujojn, tiel, ke la ordo de la paperetoj laŭeble ne konserviĝu

3. Printigu $n+1$ ekzemplerojn de la dokumento „TEJO-KER trejnado_organizoj”, kaj distranĉu n ekzemplerojn unuope tiel, ke la malsimilaj priskriberoj de la organizoj estu ĉe apartaj paperetoj – metu ilin respektive en n ujojn

4. Printigu n ekzemplerojn de la dokumento „TEJO-KER trejnado_priEsperanto”, kaj distranĉu ilin unuope tiel, ke la malsimilaj priskriberoj estu apartigitaj, kaj konservu ilin respektive en n ujojn

5. Pretigu paperojn, skribilojn sufiĉajn por ke ĉiuj povu samtempe skribi

6. Kontakti la komisiiton pri KER ĉe ker@tejo.org por aktualaj informoj pri la laboro

Plano por la trejnado

1. Bonvenigo kaj eta trarigardo de la laboro en la komisiono de TEJO-KER, krome resumo de la celoj de la trejnado. Kaze ke vi ne povas tion fari, bonvolu ludigi la videon*: Enkonduko.
2. Tasko
 - a. La trejnanto kreigu 3-6 po 3-6 opajn grupojn, disdonu al la grupoj la distranĉitajn „Lingvopolitikaj pozicioj de TEJO” kaj donu la taskon: Kunmetu la dokumenton pri Lingvopolitikaj pozicioj de TEJO!
 - i. La trejnanto permesu al ili havi 10 minutojn por tion fari (se ili pli rapidas, vi povas pli rapide fini ;))

* TEJO-KER trejnado: Enkonduko <http://youtu.be/kRuxpg88Jao>
TEJO-KER trejnado: FoJE <http://youtu.be/TSHKXL2hVMU>
TEJO-KER trejnado: Unesko http://youtu.be/EDW_wNtzRYs
TEJO-KER trejnado: IKRJO <http://youtu.be/SxRmH20EFcc>
TEJO-KER trejnado: UN <http://youtu.be/9uiQYdfnsl>

- ii. Kiam la 10 minutoj elĉerpiĝis, la trejnanto rigardu, ĉu ili sukcesis bone kunmeti, (pri la fuŝoj tre interesiĝus ker@tejo.org, bonvolu plusendi tien la informojn, se vi havas) diru al ili ke ili povas ekhavi tiun dokumenton, se ili donas siajn retpoŝtadresojn, kaj sendu poste al ili la dokumenton
3. Prezentado – pri al kio indas atenti kiam oni reprezentas TEJOn en malsimilaj organizoj. Kaze ke vi ne povas tion fari, bonvolu ludigi la klarigajn videojn*.
- FoJE
 - Unesko
 - IKRJO
 - UN (Rio+20)
4. Tasko
- La trejnanto kreigu 3-6 po 3-6 opajn grupojn, disdonu al la grupoj la distranĉitajn „TEJO-KER trejnado_organizoj” kaj donu la taskon: „Ĉi-tie estas miksitaj informoj pri FoJE, Unesko, IKRJO kaj UN – trovu kiu informo priskribas kiun organizon”
 - La trejnanto donu 7 minutojn al la grupoj por fari la loktrovadon, kaj poste simple diru la solvon, kaj demandu kiu grupo trafis, kaj laŭdu ilin, kaj permesu ilin klarigi kial ili sukcesis trovi ke tiu informo priskribas tiun organizon
5. Tasko
- La trejnanto ebligu ke ĉiuj povu sidi kaj havi paperon, skribilon kaj taŭgan skriblok
 - La tasko estas: respondu al la demando: kial Esperanto estas bezonata?
 - La trejnanto permesu al ili havi 3 minutojn por skribi
 - Kiam ĉiuj finis, la trejnanto montrigu la du videojn sube ligitajn, kaj rakontu ke Michael Boris Mandirola (eksa estrarano de TEJO pri Eksteraj Rilatoj (2011-2013)) kaj Rafael Henrique Zerbetto (prezidanto de BEJO, kaj unu el la kernaj aktivuloj malantaŭ la reprezentado de UEA dum la evento Rio+20) havis 5 sekundojn por pripensi kaj respondi en unu minuto al la sama demando...
- <http://www.youtube.com/watch?v=L3Dd2ic9e-M>
<http://www.youtube.com/watch?v=LBcLJd7Q9OM>
- rerigardu la videojn, sed nun pensante pri kiel ili enkondukas la temon, kion indas diri pri Esperanto, kiel vi plibonigus ilian (aŭ vian) respondon/parolon
6. Paŭzeto: La trejnanto faru etan movigan ekzercon, por refreŝigi la grupon (5-10 minutoj) kaj/aŭ, se vi havas sperta(j)n oratoro(j)n en la grupo, ludu similan ludon, kiel en Tasko 5, sed kun alia interesa demando. (por trovi tian demandon, ekz. demandu la grupon)
7. Tasko
- La trejnanto kreigu 3-6 po 3-6 opajn grupojn, disdonu al la grupoj la distranĉitajn „TEJO-KER trejnado_priEsperanto” (la „dirinda” „maldirinda” „ne gravas” erojn metu sur la tablojn aparte) kaj diru la taskojn:
 - Disdonu inter vi la erojn, ĉiuj havu ĉ. sammulte da
 - Ĉi tie estas kelkaj frazoj, kiuj estas eble dirindaj pri Esperanto kaj TEJO, eble ne, aŭ ne gravas, do decidu – unue vi mem! Vi havas 1 minuton por tion fari!
 - Nun interkonsentu en la grupo pri kiu ero apartenas al kiu grupo („dirinda”, „maldirinda”, „ne gravas”). Vi havas 5 minutojn por tion fari!
 - Nun ĉiuj interkonsentu (aŭ klopodu) pri kiu ero apartenas al kiu grupo
8. Fino: La trejnanto diru al ĉiuj ke ili povas praktike uzi la alproprigitajn lertojn agante en TEJO-KER, por tion fari ili donu sian retadreson (kaj la trejnanto ĉirkaŭdonu papereton kun: mi ŝatus aktivi en tiu kampo, do ankaŭ aliĝi al la komisiono de TEJO-KER). La trejnanto disdonu la formularon „TEJO-KER trejnado_Evaluado” kaj petu ĝian plenigon. (bonvolu sendi la rezultojn de la evaluado al at@tejo.org por povi plibonigi la trejnadojn) La trejnanto danku ĉies aktivan partoprenon kaj ĝisu ĉiujn!

Tiun priskribon Veronika Poór, estrarano de TEJO pri Aktivula Trejnado ne povintus krei sen la helpo, konsiloj de multaj homoj, ekzemple, sed ne nur, la partoprenantoj de la trejnadoj, HEJ-aktivuloj, Nico Huurman, Rogier Huurman kaj laste, sed plej grave: Michael Boris Mandirola, kiu per siaj agado, decidujo ebligis ke tiu trejnado realiĝu. Dankon!